**Dana Fervojisto estas organo de Dana Esperantista Fervojista Asocio (DEFA)**

Prezidanto:
Jan U. Niemann
Hovedvagtsstræde 9 E, 1
DK-3000 Helsingør
tel 71 70 63 83
aŭ 71 72 32 42
niemann@kabelmail.dk

Kasisto: Karen K. Olsen
Manøvej 6
DK-4700 Næstved
tel 55 72 73 77
bankkonto (Lån&Spar)
0400 107 10 07539

Redaktantoj: Jan kaj Lene Niemann
Vidu adreson supre.

Preso: HVS9E1

Redaktofino por venontaj numeroj de Dana Fervojisto:

1/9-2014
1/11-2014


Enhavo:


| | |
|---|---|
| paĝoj 2-3 | Ĝeneralkunveno |
| paĝo 4 | Forpaso |
| paĝoj 5-9 | 66ª IFK |
| paĝoj 10-12 | Kiu posedas kion? |
| paĝo 12 | Aktivecoj |
| paĝoj 13-15 | Temo de la jaro |


## 67ª IFK – majo 2015

**La 67-a Kongreso de IFEF**
**Kunming, Ĉinio 16-23.05 2015**

Aliĝilo kaj aliaj informoj haveblas ĉe la prezidanto.




# Dana Fervojisto

**2**

*ISSN: 1397-9914*

**67a jareldono** **Julio 2014**



***Je la fermo de la 66a IFK – transdono de la flago al Ĉinio, kiu organizos la 67an IFK-on en 2015.*** Fotis Jan Niemann.

# DEFA-Ĝeneralkunveno 2014

## okazis 18/3 en Køge

Estis trankvila afero. Ni estas kontentaj pri nia aktivecnivelo ... kvankam malmultaj ni daŭre povas helpi al IFEF pri diversaj aferoj kaj kontribui al Jernbanefritid per artikoloj por la bulteno. Ankaŭ la aspekto kaj enhavo de nia propra bulteno Dana Fervojisto estas en ordo.

Al IFEF DEFA kontribuas pleje per la aktiva partopreno en la terminologia laboro kaj per artikoloj al IF. Cetere ĉiujare (dum kelkaj jaroj nun) DEFA prizoragas enpaĝigon, printadon kaj distribuon de la FFK-oj. Ni povas fieri.

Ni devas alfronti, ke ni estas malmultaj kaj ne tro junaj. Dum jaroj ni ne plu povas allogi novajn membrojn, - la kluba kulturo ne plu estas la sama, la interreta kontakto inter homoj transprenis multon de tio, kaj la aktivuloj renkontiĝas por fari 'ion' kaj poste denove disiĝas ĝis venonta 'io'. Ni devas tion konstati, kaj nia celo nun estas donaci monon kaj helpi al aferoj, kiuj plaĉas al ni.

Post diskuto de tio dum pluraj kunvenoj la estraro faris por la ĝeneralkunveno proponon donaci al ICH Interkultura Centro Herzberg 3000 EUR de la havaĵo de DEFA - al specifaj celoj, pri kiuj ni interkonsentis kun ICH. La ĝeneralkunveno aprobis tion, kaj komence de aprilo okazis la fizika transdono de donacletero kaj mono. Nun ni antaŭĝojas aŭdi pri la progreso de la diversaj projektoj en Herzberg.

Por ne fordoni ĉion, kion ni dum la jaroj kolektis, ankaŭ ni uzas monon por 'ni mem'. Tiel la membroj ankaŭ venontjare ne pagu kotizon.






*Poul Anker Bech*

*Roelof de Roo* estas nederlandano, sed li pasigas multan tempon en Danio kaj ŝatas danajn motivojn. Ĉ. 2000 li pentris portreton de dana S-trajna stacio.



La stacio estas malplena (de homoj), kaj oni sentas, ke tiu trajno ne haltos ĉe la stacio, sed trairas. Eble post momento venos homoj, kiuj devos iri per la venonta trajno, kaj tiam okazos renkontiĝoj, ankaŭ kun homoj, kiuj venos per la trajno kaj ĉi tie elvagoniĝos. Estas somera vespero, kaj eble ankaŭ la vespero de la vivo.

Fontoj: *Dorte Fogh*: 'Frygt og fascination – danske jernbanemalerier fra 1880-erne til i dag'. Prelego 2011.

malhelaj koloroj dominas, kaj la bildo esprimas verŝajne pli da timo ol da ĝojo pri la nova vivo. Tamen oni vidas ankaŭ ombron de knabo, kiu staras malantaŭ la bariero kaj mansvingas – li salutas la trajnon (la novan vivon) kun ĝojo.

*Erik Raadal* en 1937 pentris 'Firetoget' ('La trajno je la deksesa'). Li iris de jutlanda *Gjern* al Kopenhago al la art-akademio, sed post du jaroj li revenis ... kaj post tio li restis kaj plejparte pentris motivojn de sia hejmregiono.



Tamen tiu pentraĵo ne portas la nomon de la urbo, kaj povas esti 'kie ajn'.

*Poul Anker Bech* faris en 1987 laŭ mendo de la ĝeneraldirektoro de DSB ses pentraĵojn, surbaze de kiuj oni faris la afiŝ-serion de tiu jaro. Jen unu el ili (venontpaĝe).

La afiŝoj pendis en stacidomoj kaj pramŝipoj kaj en aliaj lokoj ... la bildoj montras 'vojaĝon tra la lando', sed ankaŭ 'vojaĝon tra la vivo' oni povas vidi en la sinsekvo de la ses bildoj.

La trajno tute ne aperas en la ses afiŝoj, sed oni vidas la respegulon de vagonaraj fenestroj – tute ne-reale, ĉar kompreneble la fenestroj ne sin spegulas en la ĉielo, sed *Poul Anker Bech* ne serĉis la realecon, sed la impreson, la etoson kaj la simbolon.



Ni reelektis ĉiujn estraranojn. La estraro aspektas tiel:

Jan U. NIEMANN, prez.
Karen K. OLSEN, kas.
Lene NIEMANN, sekr.

Ni decidis fari ekskurson somere – se la sanstatoj tion permesas. Se ne, ni aranĝos almenaŭ kuneston, ĉar estas grave, ke ni vidas unu la aliajn, kvankam kunvenoj ne okazos ĝis septembro.

La kompletan protokolon oni povas havi ĉe la sekr.

Lene Niemann, 20.03.2014




99ª UNIVERSALA KONGRESO de ESPERANTO
Bonaero, 26 julio - 2 aŭgusto 2014

# Forpaso

**Preskaŭ 90-jara norvega Per Engen forpasis fine de majo.**
Li estis dum multaj jaroj delegito de UEA kaj delegito de SAT, sed pleje ni en DEFA konas lin pro liaj meritoj ĉe IFEF kaj kiel bona amiko.
Li estis dum pluraj elektoperiodoj vicprezidanto kaj poste prezidanto de IFEF. Li multe akcelis la fakan laboron de la organizo, kaj estas li, kiu iniciatis la FervojFakajn Kajerojn (artikolkolektoj kun kontribuoj pri la plej diversaj fakaj temoj), el kiuj IFEF eldonis ĝis nun 22.

Por ni persone Per estis nia 'unua eksterlanda esperanto-amiko'. Dum nia unua vizito al la kopenhaga DEFA-klubo en 1981 i.a. li ĉeestis, kaj ekde tiam ni havas kontakton. Nur EGE malofte ni inter ni 'aligatoris' en skandinava lingvaĵo. Eĉ kiam ni vizitis lin antaŭ du jaroj, li tuj parolis en Esperanto. Dum tiu vizito li esprimis, ke la kapo bonege funkcias, sed cetere la fizika stato estas malkontentiga, kaj ke li estas laca.
Dum multaj jaroj Per laboris en Bergen kaj loĝis en impona deĵora vilao en Søre Bellevueveien. Pluraj DEFA-anoj certe memoras la gastamon kaj amikan etoson – kaj la belan elrigardon – ĉe Per kaj Gunvor.

La lastpasintajn monatojn Per loĝis en fleghejmo, sed antaŭ translokiĝo tien transdonis siajn esperantaĵojn al la Oslo-a Esperanto-klubo, de kie IFEF post nelonge ricevos 'IFEF-rilatan materialon'.

Kun ĝojo kaj admiro pri multjaraj amikeco kaj aktiveco ni memoras Per.

JUN+LEN



Per kun amikoj dum Nordia Kunveno en Rapham, Norvegio. Certe vi rekonas lin de la foto.


Fotis Karen Olsen



Temo de la jaro: **'Fervojo kaj la belaj artoj'.** Ĉifoje pentraĵoj.

En 2011 du sciencistoj de la universitato en Aarhus eldonis libron: 'Frygt og fascination – Danske og udenlandske jernbanemalerier fra 1840 til i dag' ('Timo kaj fascino – danaj kaj eksterlandaj fervojmotivaj pentraĵoj de 1840 ĝis hodiaŭ'). Ĝi pritraktas kelkajn pentraĵojn, kiuj montras la ŝanĝojn, kiujn faris la fervojo al la socio kaj al la homoj, kaj la timon kaj fascinon, kiun kaŭzis tiu nova teknologio al unuopaj artistoj.

Inter la unuaj danaj pentraĵoj 'pri fervojo' estas 'Banevogteren' ('La fervojgardisto', kiun pentris en 1884, *L.A. Ring*.. *L.A. Ring* travivis tempon kun industria revolucio, translokiĝo de kamparo al urboj, grandaj sociaj ŝanĝoj kaj nesekureco kaj maltrankvilo por multaj homoj, kaj li tion prezentas en sia verko.



La nova teknologio – la trajno – venas bruanta laŭ la reloj. La reloj preskaŭ dividas la vilaĝeton en la malantaŭo de la bildo. La gardisto, kiu devas zorgi, ke neniu homo vundiĝas, kiam la trajno preterpasas, estas verŝajne bienulo (lignaj ŝuoj), kiu devis trovi alian laboron por vivteni sin. Li aspektas iomete trista kun kliniĝantaj ŝultroj – la grizaj kaj

*LB – Lokalbanen* (la loka fervojo) ekspluatas *Frederiksværkbanen, Gribskovbanen, Hornbækbanen, LilleNord* kaj *Nærumbanen.*
*rt – Regionstog A/S* (regionaj trajnoj) eskspluatas *HTJ, OHJ, ØSJS kaj Lollandsbanen.*

*Nordjyllands Trafikselskab (NT)* (nordjutlanda trafikentrepreno) estas trafik-kompanio en norda Jutlando, kiu priorgas ĉiun bustrafikon en norda Jutlando, kaj la fervojtrafikon de la kompanio *Nordjyske Jernbaner* (Nordjutlandaj Fervojoj). NT estas posedaĵo de regiono Norda Jutlando kaj la 11 komunumoj en la region, kiun kovras NT.

Fakte *nobina* (akcikompanio bazita en Svedio), novulo sur la dana bustrafik-merkato, estas laŭ nia scio la sola kompanio, kiu '100% sen ŝtata mono' trafikas eksterlande.

Konfuzita? Ankaŭ mi ... kaj fariĝos eĉ pli komplika, se oni rigardas ekster niajn limojn! Pri tio vi poste legos en IF.

JUN

## Aktivecoj de DEFA:

Ekde septembro ni denove kunvenos unufoje monate. Por pliaj informoj kaj aliĝo, turnu vin al la prezidanto

### Aliaj Esperanto-aktivecoj en Danio:

### Kopenhago

***KEK*** (prezidanto: Peter Wraae, tel 46 49 60 16, retadreso kek@esperanto.dk).

### Århus

***Kontaktulo pri DEFA*:** La prezidanto.



# 135 personoj el 19 landoj kaj 3 kontinentoj ariĝis en ĉarma urbo ĉe la Adriatika Maro

Itala San Benedetto del Tronto (SBT) estis dum bela maja semajno kadro de la 66a kongreso de IFEF.

Organize la kongereso fariĝis la plej esperplena dum jaroj. Dum antaŭaj kongresoj oni multe parolis pri malbonaj tempoj, privatigo, disigo, ŝanĝoj en la mondo, ŝanĝoj ĉe la fervojoj ... ĉijare, post kelkaj interretaj diskutoj antaŭ la kongreso, la prezidanto Rodica Todor sukcesis kolekti ĉiujn bonajn fortojn ĉirkaŭ tiuj ĉefaj punktoj:

- ni volas gardi kaj vivteni IFEFon
- ni volas haltigi la falon de la membronombro
- ni volas modernigi IFEFon
- ni volas pli bone kaj celtrafe informi pri IFEF
- ni volas prizorgi la historion kaj arĥivon

Per tri-ŝtupaj 'tasko-raketoj' laborgrupoj plenumu tiujn celojn, kaj post tiuj promesoj unuj al la aliaj ni povis plene ĝui la mirindan kaj malferman, surprize taŭgan kongreslokon.

SBT estas urbo, kiu havas 50.000 enloĝantojn, sed dum la somera sezono ĝi kreskas ĝis ĉ. 300.000. Ni venis antaŭ la sezono kaj tiel vidis la urbon, kiel ĝi estas ... kaj la enloĝantoj estis vere ĝentilaj kaj helpemaj. Povas esti, ke en septembro ili estas iom lacaj. Kvankam antaŭ la sezono la vetero belis kaj varmis. Tiel la urbo estis perfekta kadro por nia kongreso.

Hazardo (se ekzistas hazardo) gvidis nin al SBT. Dum la kongreso en Liberec en 2011 Elisa, Romano kaj Vito renkontiĝis kun hotelestro Calabresi, kiu estis en Ĉeĥio por 'montri sin'. Ekde tiam la aferoj rulis kvazaŭ sur reloj, kaj el la bona kunlaboro bela kongreso naskiĝis.

Ni du pasigis entute 12 tagojn en SBT ... ni alvenis frue kun Vito por helpi pri la lastaj preparaj aferoj, sed vere li kontrolis la aferon kaj preskaŭ ne bezonis iun helpon. Do, ni havis la eblon ĝui la urbon jam tiam. Post la kongreso ni restis kelkajn tagojn por la postkongresaj ekskursoj.

Oni sentis vere, ke estas ne 'komerca', sed AMIKA rilato inter la organizantoj kaj la hotelestro. Kompreneble ne ĉiuj kongresanoj loĝis en hotelo Calabresi, sed la kunvenoj okazis tie, kaj dum la semajno en la akceptejo kaj antaŭ la hotelo estis ĉiam multaj homoj kaj vigla babilado.

Sabate okazis en la urbdomo gazetara konferenco kun partopreno (flanke de IFEF) de unu reprezentanto de ĉiu lando, el kiu venis (ĝis tiam) kongresanoj. Post la konferenco Vito diris, ke ne estas granda eĥo, sed tamen estis en i.a. la regiona televido sufiĉe ampleksa kontribuo pri la kongreso.



Gazetara konferenco en la urbdomo. Fotis Jan Niemann

La ekskursoj gvidis nin al ĉarmaj kaj pitoreskaj vilaĝoj kaj urbetoj en la regiono. Verdire, la regiono Marche eble ne estas 'mondfama' kiel ekz-e Toscana, sed ĝi estas tre bela kaj interesa. Estas jam multaj kialoj por reveni.



*TRANSDEY*, ĝenerala transport-entrepreno (kiu pere de i.a. *connexxion* trafikas pli ol 60% el la nederlandaj buslinioj), posedas 50% *Caisse des Dépôts et Consignations*, franca ŝtata financa instituto.

*Connex/Veolia* ni konas de aŭtobuslinioj en Kopenhago, estas Akcikompanio kun sennombraj subkompanioj, - ili komercas preskaŭ kiel *FIRST*. *Veolia* ankaŭ estas parto de *TRANSDEY*!

*DB Schenker Rail Denmark Services A/S:* 51% *DB Schenker* (100% posedas *Die Bahn*) kaj 49% *Green Cargo* (100% posedas la sveda ŝtato).

*CFL* (92% luksemburga stato, 6% belga stato kaj 2% franca stato) prizorgas la fervojan vartrafikon en Danio...

*Midttrafik* (posedaĵo de la regiono Mez-Jutlando kaj la komunumoj en la regiono) posedas *Aarhus Sporveje Busselskabet* (aŭtobuskompanio, kiu veturigas la enurbajn busojn en *Aarhus*) kaj la akciplimulton en *Midtjyske Jernbaner* (Mez-jutlanda fervojkompanio) kiu ekspluatas *Odderbanen (HHJ)* kaj *Lemvigbanen (VLTJ)*.


rt-trajno, IC2-tipo, sur la insulo Lolland

*Movia* (posedaĵo de la ĉefurba regiono, la regiono *Sjælland* kaj ĝiaj 45 komunumoj) posedas la ĉefan akci-parton de du entreprenoj, kiuj siaflanke ekspluatas entute naŭ lokajn fervojliniojn en la regiono:

## Kiu posedas kion?

Ofte, kiam oni legas la taĝĵurnalojn aŭ aŭskultas la radion, oni sin demandas, kiu posedas kion. Precipe en tiuj jaroj ... multaj entreprenoj havas starpunkton en pluraj landoj, kaj estas malfacile juĝi pri la vera aparteneco.

Ankaŭ mi ofte pri tio cerbumas, kaj rilate al mia (nun antaŭa) laborloko, la fervojo, kaj aliaj transportmedioj en Danio mi vere deziris esplori. Montriĝis rapide, ke tio ne limigas sin al la danaj landlimoj, sed ankaŭ la rilatoj inter diversaj entreprenoj en tiu flanko de la komerca vivo estas araneaĵo en la plej subtila formo!

Legu nur:

**Danio**

En Danio kelkaj bus- kaj fervojlinioj estas privatigitaj. Sekve sur la danaj stratoj, vojoj kaj fervojlinioj veturas *ARRIVA*, kiu gajnis la konkurencon pri koncesio. Kiu posedas *ARRIVAn*? 100% *Die Bahn (DB)* – la germanaj ŝtatfervojoj!

Alia privata firmao, kiu veturas sur certaj buslinioj en la ĉefurba regiono, estas *CITY-TRAFIK* – kiu posedas ĝin? *KEOLIS S.A.* - kaj el ĝi posedas *SNCF* pli ol 51%, do decidpova ... *SNCF* estas la francaj ŝtatfervojoj.

Ankoraŭ aliajn kopenhagajn busliniojn estras la privata firmao *NETTBUSS*. Ĝin posedas 100% *NSB* – la norvegaj ŝtataj fervojoj.

*FIRST*, skota firmao, kiun ni en Danio tre bone konas de sia 'aventuro' sur la Marborda Linio (*Kystbanen*), estas A/S, akci-kompanio, sed eniras ofte kontraktojn kun naciaj entreprenoj kiel ekzemple *DSBFirst* (*First* 25-30%, *DSB* la resto) kaj *First Transpennine Express (First* 55%, la resto *Keolis*)





Akcepto en la regiona ĉefurbo Ascoli Piceno. Fotis Jan Niemann

Ni vizitis kelkajn urbajn muzeojn en la diversaj lokoj, sed pleje impresis nin la palpmuzeo Museo Omero en Ancona. Ties kreinto kaj gvidanto estas samtempe prezidanto de Itala Esperanto-Federacio. Li venis ankaŭ al la kongreso por prelegi pri la regiono (li estas Ancona-ano) kaj ne malplej pri sia korinfano, la palpmuzeo, kie eblas tuŝi la artaĵojn. Oni havas kopiojn de ĉ. 300 artaĵoj famaj, kaj li rakontis, ke ankaŭ vidantoj tre ĝuas la muzeon, kiu donas aliajn travivaĵojn ol 'kutima' muzeo, kie oni povas 'nur' vidi. Tion ni spertis mem la postan tagon.



Muzeo Omero

Fotis Jan Niemann

En la hotelo oni bonege traktis nin. Dum ĉiuj kongresoj estas etaj makuloj – okazas miskomprenoj, iu ion forgesis ... sed 99,9-elcente ni sentis nin en bonaj manoj. La personaro estis ĝentila kaj helpema, la manĝaĵo estis abundega kaj bongusta (kompreneble kun multaj fiŝrilataj eroj), kaj en la programo oni lasis sufiĉe da tempo, ke oni povis trankvile manĝi, babili kaj poste digesti ... itala en la plej bona senco. Manĝi ne estis nur malmalsatigo ... estis granda ĝuo .



La kongreso manĝas. Fotis Jan Niemann

La kulturaj programeroj estis tre variaj, kaj verŝajne estis io por ĉies gusto. Ne estis en la programo kiel ofte antaŭe 'bankedo kaj balo', sed tamen la kongreso dancis ... dum muzikvespero en la ĝardeno ĉe Piazzale Azzurra tute proksime la prezentado fariĝis vere inter-aktiva afero, kaj nur je noktomeze la kongresanoj iris hejmen laŭ Viale Bruno Buozzi

Estis plena programo, kiel vi povas kompreni – kunvenoj, ekskursoj, manĝoj, kulturaj prezentoj ... sed tamen estis tempo viziti la ĉarman urbon, kie la turisma sezono ankoraŭ ne vere komenciĝis, kaj tiel ni kunportas impreson pri trankvila, itala havenorbo.






Ni estis en la stacidomo – kaj ankaŭ en la urbdomo, kie la modelfervoja fako de *dopolavoro* (fervojlibertempa asocio itala) ekspoziciis dum la tuta kongresa semajno.



Regiona trajno. Fotis Jan Niemann

Dankon al ĉiuj, kiuj laboris kaj agis, por ke ni havu belegan semajnon en amika, konstruiva etoso – por nia bonfarto kaj por nia Federacio.

Kongresnumeroj 8 kaj 69.



Loreto, unu el la ekskurseloj. Fotis Lene Niemann